

KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO

DUMONATA

GAZETO



Prezo de ĉi tiu
numero estas
400 HRD aŭ 2 guldenoj

Jarabono
600 HRD aŭ
12 guldenoj

Redakcio:
Trg burze 2
ZAGREB

Pjesništvo
Hrvata u
Mađarskoj

Poemaro
de kroatoj
en Hungario



" KROATA ESPERANTISTO "

izdavaĉ i osnivaĉ
eldonisto kaj fondinto
HRVATSKI ESPERANTSKI SAVEZ
KROATA ESPERANTISTA UNUIGO
ZAGREB, TRG BURZE 2
urednik / redaktoro
Marija BELOŠEVIĆ
jeziĉno pregledala
lingve kontrolis:
Lucija Borĉić
izlazi dvomjeseĉno
aperas ĉiun duan monaton
Za sadržaj ĉlanaka odgovaraju sami autori.
Pri ĉiuj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Tisak / Presejo
" More ", Preradoviĉeva 7/1, Zagreb
tiskano / presita
1992.12.28.

cijena ovog broja / prezo de ĉi tiu numero
400 HRD aŭ 2 guldenoj (eksterlando)
godišnja pretplata / jarabono
600 HRD aŭ 12 guldenoj (eksterlando)
Eksterlandanoj pagu al UEA konto KREU-g
Ĉlanovi Maloga vijeća HES / Estraro de KEU
- Radenko Milošević, predsjednik/ prezidanto
- Marija Belošević, tajnik / sekretario
- Ivan Bekavac - Basić, potpredsjednik / vicprezidanto
- Sandra Gabriilo, potpredsjednik / vicprezidanto
- Zdenka Svetličić, potpredsjednik / vicprezidanto
- Franjo Šlabek, potpredsjednik / vicprezidanto

Mišljenjem Ministarstva prosvjete, kulture i športa Republike
Hrvatske br. 523-03-1/7-92. godine, novine Hrvatskog
esperanskog saveza "Kroata Esperantisto" oslobođene su poreza
na promet proizvoda.

Jarabono por la jaro 1993
1.200 HRD pagita ĝis la 15-a de januaro 1993
12 guldenoj por eksterlando

Estimataj,

ni alvenis ĝis la fino de unu jaro. Jaro kiu estis tre malfacila por
Kroatio, kaj en la pleja parto por Bosnio kaj Hercegovino, eble same
por la mondo, sed ĝi ne tion bone esprimis.

Tamen, ni kroatoj povas esti feliĉaj, ĉar finfine la mondo rekonis
nian patrolandon. Dankon al vi ĉiuj kiuj suferis, plendis, preĝis por
ni! Ni ankoraŭ bezonas vian helpon, vian subtenon, ni ne forgesos
ĉion kion vi-esperantistoj el la proksimaj aŭ foraj landoj faris por ni.
Ankoraŭ foje dankon!

Ni venis same ĝis la fino de nia unujara kaj unuajara renkontiĝo
sur la paĝoj de "KE", en personaj kaj skribaj kontaktoj, kaj alimaniere.
Ni esperas, ke vi estis kontentaj. Ja, ni havis erarojn, sed oni diras "kiu
laboras, tiu eraras". Sed, ni esperas, ke ĉiuj niaj eraroj estas par-
doneblaj, se oni scias en kiaj cirkonstancoj ni agadas.

Ni montris al ni mem kaj al la mondo, ke KEU scias, volas kaj
povas. En tio, vi ofte kuraĝigis nin.

Ni esperas, ke en la jaro 1993 kiu espereble kunportos la dezirin-
dan pacon al ni kaj ĉiuj popoloj de la mondo, ni pli bone kunlaboros.

Tial ni invitas vin, se vi havas proponojn rilate la "KE" bonvolu
direkti ilin al KEU ĝis la 1-a de februaro 1993, ĉar la unua numero
en la jaro 1993 aperos fine de februaro. Vi povas kontribui al la nova
aspekto kaj enhavo de la gazeto. Ni ankaŭ petas vin, ke Vi reabonu
"KE".

Same, bonvolu direkti sugestojn por la agado de KEU mem. Ni
ĉiam tre estimas kaj estimos viajn opiniojn.

Do, finante ĉi mallongan enkondukon por la lasta duobla numero
de "KE" en la jaro 1992, mi kiel redaktoro esprimas dankon al ĉiuj
kunlaborantoj, abonantoj.

Ankoraŭfoje pacon kaj bonon en la jaro 1993

Marija Belošević

MALLONGIGOJ

AI Amnestio Internacia
AngEA Angola Esperanto-Asocio
CO Centra oficejo (de UEA)
E-o Esperanto
E-istoj Esperantistoj
EK Eŭropa Komunumo
FA Faka Asocio
FEL Flandra Esperanto-Asocio
IE Internacia ekzameno
IJK Internacia Junulara Kongreso

ILEI Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
KCE Kultura Centro Esperantista
KE Kroata Esperantisto
KEJ Kroata Esperantista Junularo
KEU Kroata Esperantista Unuiĝo
LS Landa sekcio (de ILEI)
UEA Universala Esperanto Asocio
UK Universala Kongreso
UN Unuiĝintaj Nacioj
ZEL Zagreba Esperanto-Ligo

ENHAVO

MALLONGIGOJ	38
KRISTNASKA KAJ NOVJARA MESAGO	39
KONCIZE	39
TAGOJ DE KROATA ESPERANTISTA UNUIGO	40
INTERVJUO	42
REMOMORO PRI SARAJEVO	44
LITERATURA KONKURSO "IVO ROTKVIC"	45
MONATO SIN PREZENTAS	48
BILDSTRIO: OMBRO	48

INTERVJUO	49
ETULA PAĜO	50
AMUZAĴOJ	50
BILDSTRIO: OMBRO	50
PEDAGOGIA PAĜO	51
IMS	52
LA EKZAMENA ESEO	53
JUNULARA MONDO	53
AMUZAĴOJ	54
LETEROJ DE LA LEGANTARO	55
BILDSTRIO: OMBRO	55

KRISTNASKA KAJ NOVJARA MESAĜO

Kiam oni iras gratuli, oni kunportas donacojn, florajn bukedojn, ekscitecon, sed nun en ĉi tiu momento estu niaj donacoj kaj floroj amo kaj vero en koroj por homoj suferantaj, por nia patrolando, por nia ŝtato, por KROATIO.

Post jarcentoj pasis unu jaro de nia Respubliko, sed en kruela milito, kaj nia Respubliko estas ni, nia hejmlando kiu jarcentojn ventekspone staris, antaŭgordio de Okcidento kaj Oriento kaj de Oriento al Okcidento

Malgraŭ devojigoj, preteriroj kaj miskomprenoj rilate nian hejmlandon, memoru ni pri malnova saĝo,

ke tial kion la homoj pensas ke estas bone ĉiuj homoj faras kion ili faras, kaj samtiel nia patrolando,

unu jaro certe nur palpebrumo de tempo estas, sed esti sendependa lando, ĉu tio malmultas? Revo de generacioj!

Sen multaj vortoj ĉiu en sia koro sentu

por niaj infanoj
por niaj novaj generacioj
por Domo nia, por nia Patrolando.

Radenko Milošević,
Prezidanto de KEU



deseĝnis: Lujo Brigović

KONCIZE

el la agado de E-societoj

Kroata Esperanto-Fervojista Societo

Komence de novembro 1992.j. ekis E-kurso por komencantoj en la ejo de la Societo, Tomislavov trg 12.

La kurso okazas unu foje semajne kaj ĝin gvidas s-ino Štefica Flegar.

La aŭtuna ekskurso de la Societo estis en Varaĝdin kaj Ĉakovec. Kvardeko da anoj vizitis vidindaĵojn de ambaŭ urboj.

Dum la antaŭkristaskaj kaj novjaraj festotagoj, en la Societo oni organizis la jam tradician jartinan feston por siaj membroj, la 22-an de decembro. La feston dum kiu oni havis eblecon gustumi plurajn hejmfaritaĵojn partoprenis kvardeko da membroj de la Societo kaj E-amikoj el aliaj zagrebaj societoj.

Esperanto-societo "Ban Jelačić"

En la Societo daŭras la komencita kurso laŭ "Gerda malaperis..." por gejunuloj.

Malgranda festeto okaze de la kristnaskaj kaj novjaraj festotagoj okazis por la membraro la 22-an de decembro. Dum la renkontiĝo, kvankam estis festa etoso, oni trovis tempon pridiskuti la unujaran agadon kaj la planojn por la jaro 1993.

Esperanto-societo "Liberiga stelo" Osijek

Meze de decembro oni organizis jarkunvenon post iom pli longa tempo pro la konataj militaj cirkonstancoj. Dum la kunsido estis akceptita laborplano por la jaro 1993 kaj elektita nova societa estraro. La nova prezidanto iĝis inĝ. Antun Lončarić.

Ĉu vi scias?

* la 28-n de decembro 1908 fondita Unuiĝo de kroataj esperantistoj

* la 14-an de decembro 1991 fondita Kroata Esperantista Unuiĝo el la mondo

Fondita E-ligo en Angolo

Komence de septembro, la 6-an okazis fondkunsido de la Angola Esperanto Asocio, mallonge AngEA kun la partopreno de 25 homoj.

Oni elektis prezidanton, s-ron Lutumba Tima, laŭ profesio meteologo, kiu estas konata al la esperantistaro kiel tradukinto de poemoj de Agostinho Neto.

Kroata Esperantista Unuiĝo gratulas al la novfondita E-asocio kaj ĝia estraro, kaj deziras sukcesan E-agadon en tiu parto de la mondglobo.

Kultura ĉefurbo de Eŭropo

En la jaro 1993 Antverpeno estos kultura ĉefurbo de Eŭropo kaj organizos ambician programaron. Flandra Esperanto-Ligo provos inviti kiel eble plej multe da esperantistoj por partopreni en tiuj programoj. FEL provas gastigi, ĉiĉeroni, servi, helpi... Ĉefe oni invitas homojn dum du semajnfinoj: la unua de 23-a ĝis 25-a de aprilo, kaj la dua de 16-a ĝis 23-a de julio. Ankaŭ dum aliaj tagoj, FEL povos akcepti gastojn.

FEL eldonis faldfoliojn, kiu estas laŭ la skriba peto ricevebla ĉe KEU. Pliajn informojn pri la okazajoj vi povos trovi en la numeroj de "KE" dum la jaro 1993.

Kroata Esperantista Unuiĝo organizis okaze de la Zamenhoftago programon nomitan "Tagoj de Kroata Esperantista Unuiĝo". Kial ĝuste tagoj de KEU? Simple, ĉar la programoj ne okazis nur en Zagrebo, sed same en aliaj kroataj urboj.

Tamen, la ĉefa motivo de la programo estis ĝuste Zamenhoftago.

Ni prezentas ĉion kronologie:

Zagrebo, la 12-an de decembro

La komenco de la programo estis Internacia ekzameno de UEA/ILEI. Do, la unuan fojon Zagrebo gastigis la IE. Bedaŭrinde, ne abundis la intereso, sed tamen ĝi okazis. Eĉ la ekzamenkomisiono estis internacia, kio eĉ pli imponas. Tre bone sukcesis ĉe la ekzameno Gordana Svetličić, kaj vi povas aparte legi ŝian eseon. La IE okazis en la ejoj de KEU.

La dua okazaĵo samtage estis same tre inpona. La unuan fojon post la jaro 1953 kiam Zagrebo gastigis UK, okazis diservo en Esperanto. Por multaj malnovaj esperantistoj, tio estis bela rememoro pri la fora jaro. Zagrebaj esperantistoj, nemultaj, post tiu jaro havis nur eblecon ĉeesti diservon dum iu granda esperantorenkontiĝo. La diservo estis granda avantaĝo por pli junaj kaj la plej junaj esperantistoj. Ili kun granda intereso kaj eĉ grandnombre venis. Apartan ĝojon montris profesoro Franjo Grujić, el Āakovo kiu celebris. Ni aparte dankas al li pro lia alveno kaj pretiĝo de la libreto.

Same ni direktas dankon al la franciskana monaĥejo, kiu disponigis al ni la preĝejon.

Tuj post la diservo, fakte nur transirante la straton, en belega salono de la urbo, okazis solena programo. La prezidanto de KEU, Radenko Milošević direktis kelkajn kortuŝajn vortojn al la ĉeestantoj. La aganta prezidanto de la ĵurio de Literatura konkurso "Ivo Rotkvić" Emilija Lapenna prezentis la rezultojn de la konkurso en la jaro 1992 (legu aparte) kaj malfermis

la novan konkursaron, 1993. Oni transdonis la diplomon por la sukcesa IE.

En la programo partoprenis ĝelernantoj el zagrebaj



Prof. Grujić celebras la diservon

bazlernejoj kaj anoj de KEJ. Oni denove havis eblecon aŭdi bonan muzikadon de la junaj muzikistoj Martina kaj Matija Gazdek kaj Petra Kondres. Finante la programon, oni prezentis tre konatan kroatan kanton "Ne tuŝu la ebenajn, ĉar revenos mi". Speciale por ĉi okazaĵo, la kanton tradukis el la kroata Lucija Borčić. Eĉ la publiko iomete kunkantis la refrenon. Unu ĉeestinto, neesperantisto, poste diris, ke kiam li aŭdis tion, simple venis larmoj al liaj okuloj.

Kiel antaŭe, same nun, KEU kaj ZEL organizis malgrandan libroservon, plej parte kun la eldonaĵoj de ZEL kaj KEU. Aparte menciita vendado estis unikajo, skulptaĵo de Zamenhof, farita de KEJanoj. Ĉiuj faritaj-forvenditaj. KEJ nun pripensas pli serioze pri Zamenhof. Bedaŭrinde, ni povas al vi montri la skulptaĵon nur per la foto, sed se vi havas intereson vere posedi ĝin, simple skribu al la adreso de KEJ (la sama kiel de KEU).

Iom for de la vendanta tablo, oni trovis informtablon plenigitan per aliĝiloj por UK, IJK, Monda kunagado, ILEI, informoj pri abonoj kaj pluraj provkzempleroj de diversaj E-gazetoj, E-kalendarojn, ktp.

Entute, ni supozas, unu bela, riĉa posttagmezo.

Estas menciinde, ke la zagreba programo ne estis ĝuste zagreba. Alvenis esperantistoj el kelkaj kroataj urboj, tiuj kiuj ne povis veni, sendis salutleterojn. Sed la publiko ne estis nur kroata. Speciale venis s-ro Antonio el Italio, ĉar li deziris vidi kiel vivas kaj agas E-istoj en Kroatio. Aparte li ĝojis pro la diservo. Krome estis unu nia esperantistino vivanta en Germanio.

Se oni jam statistikas, la publiko ne estis nur esperanta, ĉar pluraj amikoj de ni deziris veni kaj esti kun ni. Apartan dankon al tiuj, kiuj venis al la diservo.

Dankon por la zagreba tago ene de "Tagoj de KEU" devas esti unuavice direktita al la plej junaj esperantistoj kaj al KEJ (kiu evidente funkcias).

Estis eĉ kritikoj de pli aĝaj esperantistoj, sed kion diri, venu mem kaj proponu kaj kunlaboru, ĉar ĉiam estas pli facile kritiki, ol...



Prezento de la libro (de maldekstre) Vidmarović, Belošević, Karagić

Sisak, la 14-an de decembro

Interesa prelego de profesoro Ivan Bekavac-Basić pri la internacia lingvo okazis en Zagreba apuda urbo Sisak. Trideko da interesigantoj, plej parte gelernantoj estis tre impresitaj per la prelego, eĉ eklernis kelkajn E-vortojn. Por la venintoj oni kunportis malgrandan



Prelego de prof. Ivan Bekavac-Basić



Muzeo de Lika, ekspozicio de KEU

ekspozicion de E-libroj.

Estis eluzita la ebleco, kaj oni prezentis la plej novan eldonon de KEU "Poemaro de kroatoj en Hungario".

Menciidas, ke en tiu urbo siatempe funkciis pluraj E-societoj, sed pro diversaj cirkonstancoj, la agado ĉesis antaŭ kelkaj jaroj.

Gospić, la 16-a de decembro

Iom tro for de Zagrebo, en ankoraŭ milita zono, KEU organizis sian trian tagon. Temas pri Gospić, urbo ne komparebla kun Gospić antaŭ la milito, sed tamen, la vivo venis, la lernejoj ekfunkciis, la trafiko normaligis.

En la regiona Muzeo de Lika (nomo de la regiono de Kroatio sub la montaro Velebit) estis prezentita Internacia ekspozicio de la infandeseĝnaĵoj. Se vi forĝis, temas pri la desegnaĵoj de gelernantoj-esperantistoj el Brazilo, Bulgario, Finnlando, Hungario, Rumanio kaj Kroatio. Fakte, tie komenciĝis la "vojaĝo" de la ekspozicio tra Kroatio. La ekspozicion malfermis la sekretario de KEU, Marija Belošević. Preskaŭ cent interesigantoj partoprenis la prelegon pri Esperanto, kaj vidis la kunporteblan malgrandan ekspozicion de la E-eldonaĵoj. Ciu ĉeestinto de la prelego ricevis malgrandan donacon de KEU. En Gospić oni same prezentis la libron de KEU "Poemaro de kroatoj en Hungario".

La okazaĵo estis tre bone menciita en la lokaj radio kaj gazeto.

Zagrebo, la 18-n de decembro

Post Osijek, Sisak kaj Gospić en Kroatio, kaj Pecs en Hungario, venis vico al Zagrebo prezenti la poemkolekton "Poemaro de kroatoj en Hungario".

La libron prezentis ĝiaj tri redaktoroj, dr. Mijo Karagić el Budapeŝto kaj prof. Đuro Vidmarović kaj Marija Belošević el Zagrebo.

S-ro Vidmarović ĉe la komenco diris: "En ĉi tiu malfacila momento por ni ĉiuj en Kroatio, kaj same por la eldonistoj kaj kulturaj agantoj, oni trovis monon kaj bonvolon kaj entuziasmon kiuj kreis ĉi tiun dulingvan eldonadon "Poemaro de kroatoj en Hungario" per kiu la kultura poezia heredaĵo de Kroatio en Hungario proksimiĝas ne nur al la kultura heredaĵo de Kroatio, sed dank' al esperanto, kiel internacie rekonita lingvo al la tutmonda kultura unio. Tio estas certe granda okazaĵo, kaj mi kiel homo kiu okupiĝas pri diasporologio kaj bona konanto de la literaturo de kroatoj en Hungario, kaj kiel ano de la Komisiono por la homaj liberecoj, naciaj kaj etnaj malplimultoj de la Kroata Parlamento gratulas al la eldonisto Kroata Esperantista Unuiĝo."

Sekvis interesa prelego pri la cirkonstancoj en kiuj verkis kaj vivas kroataj poetoj dum jarcentoj en Hungario. (En unu numero de KE en la jaro 1993 ni prezentos ĝin).

Dr. Karagić mallonge aldonis kelkajn faktojn al la prelego.

Sekvis prezento de pluraj poemoj el la libro.

La prezenton ĉeestis pluraj personoj kiuj tre bone konas ĉi temon, kaj en la dua parto oni eĉ malfermis malgrandan diskutotablon pri la verkado de kroatoj en Hungario, dum kiu oni plej parte menciis grandajn malfacilaĵojn.

Dum la muzika paŭzo muzikis Martina Gazdek.

Kaj finiĝis tagoj de KEU.

Oni ja certe povas esti kontentaj. Unue, la esperantistoj esprimis intereson pri la programoj, normale laŭ siaj elektoj (ne ĉiuj ŝatas solenajn programojn kaj prezentojn de la libroj).

Due, la nacilingvaj gazetoj montris "vivsignon" rilate Esperanton.

Kaj laŭ ĉio ni povas nur kompletigi laborplanon de KEU por la jaro 1993, jen kelkaj rimarkoj:

- oni organizos en Zagrebo kelkajn diservojn en E-o, unua certe antaŭ Pasko
- ekspoziciojn kaj E-kursojn oni organizos en Gospić kaj Sisak
- similajn programojn oni provos prezenti en aliaj kroataj urboj
- oni organizos denove "Tagojn de KEU" en decembro denove ne nur en Zagrebo kaj provos venigi pli da eksternandanoj
- IE estos en la jaro 1993 eĉ du foje, (aprilo kaj decembro)

Vi verŝajne rimarkis, sed tion ni aparte ne menciis, ke fakte la 14-a de decembro estis la unua naskiĝtago de KEU. Ni opinias ke vere per tiu programo kaj tutjara agado, KEU ricevis la plej belan gratulon kaj kuraĝon iri ne nur antaŭen, sed OBSTINE ANTĀŬEN!

Profesoro doktoro Zvonimir Šeparović parolas por "KE" pri E-elsendo, sia mandato en la Kroata registaro, rekono de Kroatio, Centro por genocido kaj militviktimoj.

"KE": Profesoro Šeparović, Vi estas konata en- kaj eksterlande. Tamen, bonvolu mallonge prezenti Vin por la legantoj de "KE".

Šeparović: Mi estas universitata profesoro, mia fako estas juro-kriminologio, fakte unu nova branĉo viktimologio. Mi estis unu el la fondintoj kaj prezidanto de la Tutmonda viktimologia societo.

Unu jaron (red. de aŭgusto 1991) mi estis ministro de eksteraj aferoj en la Kroata registaro de la demokrata unueco. Do, mi estis en la Registaro de la tempo kiam Kroatio ankoraŭ ne estis internacie rekonita, ĝis ĝia eniro en UN kaj vasta monda rekono. Mi havis honoron esti la unua ambasadoro de la Respubliko Kroatio ĉe UN.

Eluzante ĉi tiun eblecon, mi salutas "KE", Siatempo mi mem lernis E-on. Poste mi ofte "kaptis" min mem aŭskulti vespere malfrue E-elsendon de Radio-Zagreb, kiu bedaŭrinde ne plu ekzistas. La elsendo estis signo ke la tago kaj semajno finiĝas, sed oni havas interesajn kaj aktualajn informojn por la mondo. Mi testis mian komprenon de E-vortoj laŭ kono de romanistaj lingvoj.

"KE": Ĝuste Via tasko, tasko de la ministro de eksteraj aferoj estis klarigi al la mondo kio okazas ĉe ni. Vi povis tion paroli eĉ pli profunde, kiel profesoro, viktimologo.

Šeparović: Jes, dum tiu tempo la Kroata registaro havis du gravaj kaj grandajn taskojn: la unua defendi la landon kaj la dua: klarigi, kredigi la mondon, ke ni deziras justecon, ĉar nia rajto, rajto de memstareco estas internacia rajto. Ni ne deziris atingi ĝin perforte. Tiuj niaj atakantoj, niaj malamiko kun la armiloj kiujn ni ĉiuj pagadis dum la komunisma reĝimo, atakis nin, agadis kontraŭ ni.

Mi kiel viktimologo povis eĉ pli kredinde paroli pri la infero en kiu ni troviĝis. Ankoraŭ nun mi opinias, ke la metaforo de nia defenda milito estas Vukovar, urbo el kiu oni forpelis aŭ mortigis 50.000 homojn. Tuj sekvas Dubrovnik.



Dro Zvonimir Šeparović kun Butros Butros Ghali,
la ĝenerala sekretario de UN

Sed mi komprenis dum miaj vojaĝoj tra la mondo, ke oni, la mondo, ne scias pri ni multon aŭ ne scias sufiĉe, kaj tial oni ne komprenas la motivojn de la milito. Tial mi tuj, jam en septembro 1991 proponis al la kroataj intelektuloj verki libron. La rezulto estas "DOCUMENTA CROATICA" subtitolita "On Croatian History and Identity and the War Against Croatia". Tiun libron mi povis lasi sur la tabloj, en ĝi estas prezentitaj niaj vundoj, ni montras kio okazas al ni, ke oni deziras ekstermi nian nomon, nian signon, kulturon, nian restadon sur la terspaco kie ni vivas dum jarcentoj. Ne estis facile, mi devis montri ke temas pri la defenda milito, ke ni estas viktimo.

"KE": Laŭ onidiroj, meritoj por la internacia agnosko de Kroatio apartenas ankaŭ al Vi. Tamen, tio ne iris ĉiam glate, eĉ frontis grandaj, neatenditaj problemoj.

Šeparović: Pozitivaj reagoj venadis el Aŭstrio, Germanio, Danlando, Belgio, iom malplibonaj el Nederlando kaj Hispanio. Portugalio same bone komprenis. Ilia ministro de eksteraj aferoj estis mia kolego, rektoro de la universitato, kiel mi antaŭe, ni interŝanĝis salutojn per "rector magnificum". Tiam li prezidis EK. Nekompreneon ni renkontis ĉe Britio, hipokritaj estis en Greklando.

Mi sufiĉe frue eksentis, ke ni devas direkti niajn fortojn al la nealiancitaj landoj. Nin rekonis Egiptujo kaj Indonezio, kiu tiam prezidis la nealiancitan movadon. Malfermitaj restis nur kelkaj landoj kun Zambio. Finfine, nealiancitaj landoj voĉdonis por ni en UN. Oni ne povas forgesi, ke ĝuste tiuj landoj konstigas grandan voĉdonaparaton en UN. Nealiancitaj landoj ne estas nur interesaj por la Respubliko Kroatio pro la ekonomia kaj komerca kialoj, kie ĝi povus trovi merkaton. Ne forgesu, inter tiuj landoj estas ankaŭ mediteraneaj landoj, tio gravas. Kun la granda atento ni alproksimiĝis al Ĉinio kaj Rusio, iama Sovetunio. Ĉina reprezentanto ĉe UN estas unu pacienca homo, de kies vizaĝo oni nenion povas tralegi. Li ne akceptis nin brakume, sed verŝajne tio estas ĉina ĝentileco. Mi esprimis deziron viziti lian landon, kaj tio estis nepripensebla, ĉar Ĉinio eĉ per unu signo ne montris intereson kaj deziron pri la rekono. Ni havis informojn, ke ili kunlaboris kun Serbio, donis al ili gason, kaj tio tre gravas en la milito. Tiam ankoraŭ Kroatio ne estis en UN. Min akceptis la ministro kun ĉiuj honoroj, ni iris al la Granda muro, kie mia anstataŭanto kaj mi levis etan kroatan flagon, kaj tia maniere Kroatio venis al Ĉinio.

Estas interese kiam vi demandas min pri la problemoj. Ili estis rilate Ĉeĥoslovakion. Ilia ministro de eksteraj aferoj estis tre ligita al Jugoslavio. Tio eĉ pli doloris, se oni scias, ke temas pri unu slava lando, ni havis komunajn destinojn, ni vivis kune en unu ŝtato, aŭstro-hungara, ekzistis edukaj kaj kulturaj rilatoj, multaj niaj gravaj nomoj studis ĉe la Karola universitato, iliaj turistoj venadis al Adriatiko. Sed malgraŭ ĉio, oni estis pretaj rekoni Slovenion, sed Kroation ne, ili menciis kelkajn problemojn (pri la etnaj malplimultoj, neregado sur la tuta teritorio). Mi plurfoje substrekis, ke iliaj malplimultoj en Kroatio nun defendas sian patrolandon Kroation, en kiu oni povas uzi sian lingvon, eldoni librojn, gazetojn.

Rusio ĉiam estis problemo, ili neniam estis sinceraj profunde. Oni devas scii, ke preskaŭ 42 milionoj da rusoj vivas ekster la landlimoj, kaj se oni uzus la formulon de Serbio, ili povus batali por ĉiuj teritorioj kie vivas rusoj, precipe por pribaltaj ŝtatoj, tio estus katastrofo.

Granda amiko montris sin Islando. Ilia ministro de eksteraj aferoj aspektas bone, noble, sinregante, vera intelektulo. Dum unu restado en Novjorko, post la komuna tagmanĝo li invitis min al Islando. Kaj ĉar ne estis iaj formalaj, povis okazi, ke ĝuste Islando estis la unua post Slovenio kaj plibaltaj ŝtatoj kiuj rekonis nin. De Izraelo ni estis sufiĉe frue, eĉ mirinde frue rekonitaj. Mi substrekas mirinde, ĉar oni diris ke la prezidanto Tudman estas antisemitisto, eĉ unu mian eldiraĵon oni montris el alia aspekto. Ni ne estas antisemitistoj, en la ministerio unu mia kunlaboranto estis judo.

"KE": La Centro por genocido kaj militviktimoj kiun Vi nun estras, estas relative nova organizo.

Ŝeparović: Jes, la Centro estis fondita en oktobro ĉ.j. ene de la Kroata viktologia societo. La Centro deziras kolekti informojn, ĉiujn haveblajn, nin interesas civilaj viktimoj kaj civilaj detruitaj loĝlokoj kaj aliaj objektoj. Tiu ĉi milito ne havas viktimumkriteriojn, oni sen ia ajn kialo mortigas infanojn, ĵurnalistojn, detruas kulturajn, hospitalojn precipe, kaj nun tiu fenomeno en Bosnio, perfortado de virinoj. Mi vidis la hospitalon en Vinkovci, tio aspektas strange, stranga monumento de la homa malbono. Ankaŭ nin interesas rifuĝantoj kiuj kunportis grandegajn problemojn. Kompreneble, murdigo estas la plej stranga krimo, sed tiuj ne estas solaj krimoj. En ĉi tiu milito ekzistas veraj krimuloj, ne temas nur pri grupeto en iu estraro aŭ grupeto de drinkemaj ĉetnikoj, tial nia atento estas direktita al la malkovro de krimoj kaj krimuloj. Kvankam unuavice nin interesas iliaj viktimoj.

La rezultojn de nia esploroj ni prezentos al internaciaj organizoj. Ni jam kontaktis eksterlandajn organizojn kiuj okupiĝas pri la homaj rajtoj, ekz. la Komisionon pri homaj rajtoj ĉe UN, la Internacian helsinkan federacion, la Internacian komitaton de juristoj por homaj rajtoj, multajn organizojn en Novjorko kaj Voŝingtono, Amnestion Internacian.

Tre intense dum la milito kolektis tiujn informojn la sanitara servo de Kroatio, la Ministerio de defendo havis unu sektion, kaj polico same.

En Sanremo oni antaŭ nelonge organizis kunvenon teme ligitan kun la iama Jugoslavio. Ĝi okazis en la internacia instituto pri la homaj rajtoj. La kunorganizanto estis antimilita sekcio el Beograd. Ili provis trudi ĝin kaj bedaŭrinde estis subtenataj de iuj, la opinion pri la egaleco de ĉies kulpoj. Aparte mi reagis al la eldiraĵo de la estro de Supera komesariato por rifuĝantoj. La tezo estis ke plej multe suferas la muzulmanoj. Se oni parolas pri la milito en Kroatio tiam plej suferis kroatoj kaj aliaj kiuj vivas en Kroatio. Sed la plej granda eraro estas, la provo egaligi la kulpon eĉ sen aldono kiun uzas aliaj, ekz. Internacia komisiono pri militkrimoj de UN, kiu diras, ĉiuj kulpas, sed pleje la atakantaj taĉmentoj, la estinta jugoslavia armeo kaj la serba estraro. Tiu formulo estas pli proksima al la vero. Sed tio estas ĝermo de riproĉado al la viktimo, ke ĝi eble tro forte defendis sin, sed ĉiokaze, tio estas ĝermo de fingromontrado al Kroatio kaj Bosnio kaj Hercegovino, ke aliaj kulpas, ne nur serboj. Ni devas tion rebati, sed ne per krioj, sed argumente. Ĉar argumentoj ekzistas, oni scias kiu komencis la militon, per kia potenco, kaj ke eĉ unu granato ne falis sur la teritorion de Serbio kaj Montenegro. La detruado de Dubrovnik estis absurda, eĉ el la strarpunkto de militgvidado. Ili elpensis endanĝerigon de Knin, kaj ke pro tio oni devis defendi sin. Ke tio ne veras, ni scias. Kvankam tio estas ilia preteksto. Sed ni diru, ke tio okazis, de tio devenas la Leĝo de indulgo de Respubliko Kroatio. Ĝi komprenigas ke iu povis esti gvidata, ke iu komencis la armitan ribelon, detruis arbojn, laborojn, t.n. trab-revolucio. Tion parton de la milito oni povas senkulpigi, oni ne povas senkulpigi la detruitajn Vukovar.



"KE": Kroata viktologia societo funkcias dum la milito, kunlaboris kun aliaj organizoj.

Ŝeparović: Ni skribis sufiĉe da apeloj, plej parte dum la printempo 1991, kiam ni eniradis la mondon. Mia plej bela momento estis la vizito al la Sankta Patro Johano Paolo II, fine de aprilo 1991. Mi transdonis al li la apelon de kvin gravaj institucioj el Kroatio: la universitato, la Kroata akademio de artoj kaj sciencoj, la Kroata PEN, Matica Hrvatska (la Centro Kroata) kaj la Unuiĝo de kroataj verkistoj. La apelo estis serioza atentigo pri la minaco kiu alproksimiĝis. Tio estis nur kelkajn tagojn antaŭ la incidento sur Plitvice.

"KE" Eksterlandaj humanaj organizoj kaj tiuj kiuj okupiĝas pri la homaj rajtoj, taksas Vian personan kaj la agadon de la Centro kaj de la Kroata viktologia societo tre grava. Ili venas al Vi, intervjuas, informigas.

Ŝeparović: Jes, kun mi parolis reprezentantoj de la Komitato de eŭropa kunlaboro kaj sekureco, kiam ili estis en Zagrebo. Ni parolis pri la viktimoj, sed ilin aparte interesas krimoj faritaj de kroatoj. Kaj ĝuste ie tie troviĝas tiu ruĝa linio kiu atentigas nin, ke la mondo estas preta kulpigi nin. Ili ĉiam atentigas pri Gospić, Karlovac, Sisak, ili tie vidis kelkajn krimojn, kiujn faris ĉu kroata armeo aŭ neregulaj taĉmentoj. Ili atentigas pri la minaco al serbaj hejmoj, pri libereco de publikaj informiloj. Pri tio ni devas normale paroli, se ĉe nia flanko okazis krimoj, tio ne estas parto de la sistemo, parto de la oficiala politiko, tio okazis en la defenda milito, dum kiu okazis strangaĵoj al kroatoj. Iuj kiuj trasuferis, multon perdis, en tiu malespero nigriĝis al ili. Ni havas informojn, ke ĝuste en Gospić tiaj homoj tion faris, kaj al malbono respondis per alia malbono. Tion oni ne povas pravigi, tio estas kontraŭleĝa, jure oni tion nomas transiro de la limo de necesa defendo, kaj tion oni devas alimaniere rigardi. Tio estas ĉe la rando, ĉar krima akto en la defendo eliminis ĉiun respondecon, ne ekzistas krimo akto, ĉar ne ekzistas baza elemento. Tio estas nia argumento.

Atentigo pri la minacado al la hejmoj, estas absurda, kaj oni devas ĉesigi tion. Ĉar tia maniere oni ankaŭ minacas la juran sistemon de la ŝtato.

Same ni povas rimarki ĉe la demando pri la libereco de publikaj informiloj. Ni havas liberecon tiu kampe, sed ĝi estas en iaj segmentoj, precipe la televido, endanĝerigita, direktita. Ĝuste pro tio, Kroatio havas intereson havigi liberecon de ĉiuj publikaj informiloj. Oni devas evoluigi la senton pri respondeco de tiuj kiuj parolas, skribas. Libereco ne signifas, ke ĉiu povas paroli ĉion kio venas en lian kapon,

senrespondece, vundante la aliajn. Tiaj aferoj estas krimaj aktoj, tio estas senrespondeca agado kaj laŭ ĉiuj leĝoj puninda. Tio estas misuzo de la libereco.

"KE": La Centro eldonas...

Ŝeparović: Nun en la preparo estas la revuo "Viktimologio" kaj plia eldonaĵoj de "Documenta Croatica". En Dubrovnik venontjare (1993) ni estos gastigantoj de unu internacia konferenco pri genocido kaj militviktimoj. Ĝi okazos kadre de PEN-kongreso. Ni ne parolos nur pri la iama Jugoslavio, sed same pri la iama Sovetunio, Afriko, k.a.

"KE": Via Centro krom la kolektado de informoj, provas defendi viktimojn, helpi ilin.

Ŝeparović: Momente ni okupiĝas pri vukovaranoj. Ili deziris viziti sian urbon okade de la Tago de mortintoj. Sed estis malpermesite. Ni iris kun ili al Vinkovci kaj tie ĉeestis diservon, ni daŭris al Nuŝtar, kie ni bruligis kandelojn. Ankoraŭ du kilometrojn ni alproksimiĝis al Vukovar, ĝis la linio kie oni haltigis la batalon. Ni estis celobjektoj de pafantoj el najbaraj domoj. En la aŭtuna nebulo ni triste rigardis al la direkto de Vukovar, kiu videbletis. Estis vidinta taĉmento de UNPROFOR (red. la defendaj taĉmentoj de UN en la iama Jugoslavio) sufiĉe proksime al la ĉetnika stabo, kie muziko ĉesis post nia alproksimiĝo. Denove ni petis la generalon Nambiar (red. estro de UNPROFOR), ke oni ebligu viziton de la vukovaranoj okaze de Kristnasko, almenaŭ simbole, nur al la paroĥestro kaj kelkaj personoj, ke ili havu diservon en sia preĝejo, vidu siajn domojn, bruligu kandelojn. Sed denove oni malpermesis. En aliaj regionoj kiuj estas okupitaj tiuj vizitoj pli malpli sukcesas sub la defendo de UNPROFOR, sed tiu orienta estas problemo. UNPROFOR klarigis al ni, ke la loka administrado estis kontraŭ la vizito. Nun en Vukovar ŝanĝiĝis 60% da loĝantaro, tre militemaj estas serboj venintaj el aliaj partoj de Kroatio kaj Bosnio kaj Hercegovino, kaj UNPROFOR ne povas certigi la sekurecon.

Tio estas nur ekzemplo, kia maniere ni provas defendi interesojn de individuoj aŭ grupoj.

Mi estas ĵus ricevinta leteron de unu vukovaranino, kiu laŭ sia rememoro skribas, ke kiam oni forveturigis ili al Serbio, al malliberejo, ŝi vidis freŝan ŝakton dek metran. Tio povus laŭ ŝi esti unu el la grupaj tombejoj, kaŝitaj. Ni petos pli da informoj, kaj provos ĉi tie sur la mapo lokigi ĝin. Tion oni povus eluzi en serĉado de krimuloj kunlaborante kun la Komisiono de UN. La kunlaborantino de tiu komisiono, prof. Hampson estis en Zagrebo, kolektis informojn kaj informis la Komisionon. Ni parolis kun ŝi, sed same parolis iuj profesoroj, kiuj pri ni parolas unuflanke, nur pri la supozeblaj krimoj faritaj de kroatoj. Tial estas tre grave kunlabori kun tiaj internaciaj organizoj, ke ili ricevu objektivan veron. Estas timinde malbona indormado, aŭ prezento de nur kelkaj incidentoj kiuj povus kaŝi kroatajn suferojn kaj multajn viktimojn.

Intervjuis: M. Beloŝević

Rememoro pri Sarajevo

Promemante en Sarajevo antaŭ jaro kaj duono oni povis trovi tre interesan afiŝon ĉe la enirejo Universitata Esperanto Klubo.

Tradukinda estas la alvoko: "Enrigardu en la mondon de Esperanto, eble vi ekamos ĝin".

Badaŭrinde, hodiaŭ ĉi foto povas esti nur rememoro pri unu bela urbo kaj amika Esperanto-etoso.

M. Beloŝević



PROKLAMO

de la rezultoj en la 5-a Literatura Konkurso "Ivo Rotkvić '92" en organizo de Zagreba Esperanto - Ligo.

La 3-membra ĵurio Emilija Lapenna, Lucija Borčić kaj Ivo Borovečki prijuĝis 35 konkursaĵojn en ĉiuj konkursaj branĉoj: 25 origilajn poemojn, 3 prozaĵojn, 6 librojn kaj 1 videobendon.

Ne estis konsidereblaj 1 prozaĵo kaj 2 libroj pro formalaj mankoj.

Siajn kontribuojn sendis 7 aŭtoroj el 7 landoj, po unu el Kroatio, Makedonio, Hungario, Germanio, Italio kaj Francio.

La ĵurio decidis:

Poezio

La unua premio ne aljuĝita.

La dua: Pier Giorgio el Italio pro "Romantisme"

La tria la sama aŭtoro pro "Amadeus"

Laŭda mencio:

Nada Goldner el Kroatio pro "Ŝia strato
Nevenka Tomić el Makedonio por "Sentitola"

Prozo

La unua kaj la dua premioj ne aljuĝitaj.

La tria:

Nevenka Tomić el Makedonio pro la novelo "Vizio";
Lopiro de Anavalo el Germanio pro la scenludo

"Fermano kaj homo"

Libro-forma eldonaĵo

"Poemaro de kroatoj en Hungario"/"Pjesništvo Hrvata u Mađarskoj" en eldono de Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb.

Minoritatoj estas nun la plej emfazita temo en la monda politiko. Tiun temon en formo de poeziaj kreaĵoj de la kroata malplimulto en Hungario, reflektas esperantigo kaj prezento al la vasta internacia publiko.

Ljubomir Trifončovski "Manuskriptoj por bruligo" originalaj prozaĵoj en eldono de Pres-Esperanto, Sofio -92

Etampleksa, diverstema kaj diversgenra, ĝi taŭgas por riĉigo de esperantaj aranĝoj plurnivelaj kaj plurcelaj.

Videobendo

La ĵurio ne opinis sin kompetenta prijuĝi videobendon. Ĝi akceptis pozitivan opinion de Marija Belošević amatora sonbendiganto kaj Vlado Jurković profesia sonregistristo de la respublika televido.

Aŭtoro de la sonbendo Lopiro de Anavalo el Germanio. Titolo "Alumeto kaj skatoleto" kies enhavo estas mesaĝo direktita al la natura fenomeno fajro.

La kvina Literatura konkurso "Ivo Rotkvić" finiĝis kaj tuj malfermas sian parnasan pordon al la sekvontjara Literatura konkurso "Ivo Rotkvić '93".

Zagreb, 12-an de decembro 1992.

Aganta prezidanto de la ĵurio

Emilija Lapenna

Recenzo de la premiita libro:

Eta, misforma kaj pluruzebla

Ljubomir Trifončovski-Trifo: MANUSKIRPTOJ POR BRULIGO.

Originaj etverkoj. Prefaco: Giorgio Silfer. Eldonisto: Pres-Esperanto, Sofio, Bulgario, 1992. Malgranda broŝuro, 32-paĝa.

Kontraste al pluraj inklinaj tro pozitive taksi la propran verkon, la bulgara aŭtoro el la titolo de sia libro sugestis ke ĝi estu "bruligita". Ankaŭ tio estas neakceptebla troigo kiel ĉiuj aliaj. Ĉiu aŭtoro decidinta aperigi sian verkon, ambicias ke iu rimarku, akceptu, komprenu kaj ekŝatu ĝin. Se tiaj ambicioj ne ekzistas, la aŭtoro lasu la manuskriptojn en sia tirkesto kaj tie ĝi atendu "bruligon".

Troa sinamo kaj troa modesto estas du flankoj de la sama nocio: negativismo.

La verko de Trifo konvenas al pluraj grupoj, kiuj en la korproksima "Balado pri la Luno kaj la Cervo", rekonos ŝaton por bestoj. Trafa programero por lernejoj aranĝoj. La verko entenas ankaŭ etprozaĵojn, du-triliniajn poemetojn, mornan scenaron por ombroteatro kaj pupateatraĵoj kun indiko "por la plej etaj infanoj". Tiu lasta, kvankam verkita en la stilo tre proksima al infanoj, kiun la aŭtoro estinte pupateatraro bone konas, havas vastan tuthoman dimension: du kokidoj arde kverelas pro bagatelajo.

La saman kutimon praktikas milionoj da homoj en la tuta mondo.

La lingvo fidele sekvas la enhavon, celante esti komprenebla por ĉiuj. Ĝi estas. Eble nur al harfendulo povas malplaci "kun peza pluvo", aŭ floroj kiuj estas "kun petraĵoj" ne sur ili. Ni ne estu harfenduloj kaj ne bruligu la "Manuskriptojn" de Trifo.

Emilija Lapenna

Pier Giorgio: ROMANTISME

En mia malnova lernolibro
mi trovis, ĉi-vespere,
sekiĝintan miozoton.
Ekpaŭzis la spiro
dum traprisme
de la velkinta infloresko
mi vidis la koloron
de viaj lazuraj okuloj
diamante brilantaj,
kaj ĉe l' senlimfa tigo
mi rekonis la delikatecon
de via mano
kiu kaŝis ĝin
kun emocia ekstremo.
Tiu adoleska gesto
igis la floron eterne viva:
ve! ĝin ne la tempo sekigis
sed l' ombro kaprica
de miaj stompitaj revoj.
Kaj nun, en ĉi vizi' silenta
aromanta pri vortoj nediritaj,
ĉio pri ni
ree pulsas vivoplene.

Pier Giorgio: AMADEUS

Restis muta, frue silenta, l' fajna
verk' muzika, kiun Atrop' tenebra
per embusk' insida, kruele, seke,
igis forsona.

Venkis vin nur Fata Destin': la kora
puls', genie ĉiam altranga, haltis
kree. Nun l' agordojn magic lulas
Muzo Eŭterpa.

Morne tiam Saljeri ĵaluzis: kovis
li, sekrete, blufon perfidan kiam
sin prezentis fulme, majestis aĝle,
Mozart Volfango.

Vian lastan verkon Saljeri volis
por konstrui sian futuran gloron.
Astra lumo manki al li: superi
vin li ne povis.

Ĉarme lirlas via muziko ĉirkaŭ
mi; ekvilibras streĉe l' spirita kordo;
mia sango ondas ravite; l' pulmoj
ŝvebe spirmankas.

Viaj fingroj sorĉe tuŝantaj l' klavojn
min envultas, dume l' anim' ĉielen
soras kaj kompleta forges' de l' mondo
regas arkane.

Nada Goldner: ŜIA STRATO

dezerta estis
(sed plena de trafiko densa!)
-ĉar li forestas...

malplena estis
(sed plena de homoj!)
ĉar li forestas...

griza estis
(sed suno radias kaj ĉielo bluas!)
ĉar li forestas...

Jen denove li trapasos
ŝian straton
kaj estos ĉie
ĉielo blua
suno arda...
Sed ĉu denove
ĉio dezerta
kaj neniue ĉeestas
Ne - homoj ĉeestas, ĉio plenplena
sed ŝiaj okuloj
vidas nur lin...

Nevenka Tomić: SENTITOLA

Pafado, ĉiuflanke armiloj
Infanoj, falitaj ludiloj
Fenestroj, alcelitaj fusiloj
Rifuĝintoj, forlasitaj luliloj
Keloj, malesperaj homoj
Stratoj, detruitaj domoj
Ploro, doloro pro vundoj
Tombejo, tranoktejo de hundoj
Batalkampoj, buĉejo pro maniuloj
Hospitaloj, plenaj de kripluloj
Armistico, promeso de mensogemuloj
Milito, ideo de frenezuloj

Lopiro de Anavalo: **FERMANO KAJ HOMO**

(Du scenoj, F= Fermano, H= Homo)

FERMANO

F- Mi estas fermano...
H- Mi estas homo.
F- Tio ne signifas multon, esti homo sen esti fermano.
H- Pro kio?
F- Sed ankaŭ vi estas homo kaj nur aldone fermano...
F- Ĉu vere? Pro kio ne ĝuste inverse?
H- Tion ili diris al vi post via naskiĝo.
F- Kiu diris al mi?
H- Via patro, via patrino, aŭ onklino, amikoj, aliaj fermanoj, mi ne scias.
F- Jes, mi memoras. Mia patro ĉiam diris: vidu, jen nia Fermano. Bela kaj granda! Kaj ni kuraĝe kaj ofere konservis ĝin por vi!
H- Do, klare. Vi estas edukita homo. Kiel simpla bebo homo, kiel edukita plenkreskulo fermano, ĉu ne? Oni certe devas esti edukita por esti bona fermano.
F- Jes, jes, prave
H- Kaj resti bona fermano...
F- Jes, kompreneble. Mi estas tre fiera kaj dankema pro nia pasinteco.

H- Unufoje fermano, porĉiam fermano. Ĉu ĝuste?
 F- Jes, absolute!
 H- Mi komprenas. Vi loĝas en la bela kaj granda lando Fermujo, kuraĝe kaj ofere me konservata. Vi estas ano de fermo...

HOMO

H- Mi estas homo...
 F- Mi estas fermano el Fermujo.
 H- Ha, denove, ano de fermo. Vidu, fermano: tio ja ne signifas multon, esti fermano sen esti homo.
 F- Pro kio?
 H- Ĉar esti homo pli valoras ol esti unu el kelkaj fermanoj.
 F- Sed ankaŭ vi estas aldone iu ano aŭ ulo, ĉu ne?
 H- Vere, sed tamen nur hazarde, samkiel mi nur hazarde estas homo kiel nur unu formo de ĉio viva.
 F- Tion ili diris al vi post via naskiĝo.
 H- Kiu diris al mi?
 F- Via patro aŭ pastro, via instruistino, iu amiko aŭ aliaj homoj, mi ne scias...
 H- Jes, mi memoras. Mia patro ĉiam diris: Vidu, jen nia blua Planedo Tero. Bela kaj grandioza! Kaj ni kuraĝe kaj ofere me konservis ĝin por vi!
 F- Do, klare. Vi estas edukita homo. Kiel bebo potencie ĉiu, poste kiel edukita plenkreskulo bona homo, ĉu ne? Oni certe devas esti edukita por esti bona homo...
 H- Jes, jes, prave!
 F- Kaj resti bona homo...
 H- Jes, kompreneble. Mi estas tre fiera kaj dankema pro tiu eblo de la evolucio.
 F- Unufoje homo, por ĉiam homo. Ĉu ĝuste?
 H- Jes, absolute.
 F- Mi komprenas. Vi loĝas sur la bela kaj grandioza Planedo Tero, kuraĝe kaj ofere me konservata. Ŝajnas, ke vi estas homo, jes...

Nevenka Tomić: VIZIO

Somero, junio. Io malfukciis, mi estis suspektema. Li venis sen antaŭe telefoni. Ne gravas, estas bone ke li venis, eĉ tiel mi ne intencis promeni tiun vesperon. Mi diris: "Ĉu vi scias kio estas nova, mia filino...". "Vidu, ni povas esti nur amikoj", li diris. Mi trankvile diris: "Nova virino, ĉu ne?" "Ne demandu, vi estas saĝa virino, mi scias." Li tuj poste eliris, mi restis sidi ŝtoniĝinta. Subite la planko kaj la seĝo komencis sin movi, mi kriis kaj falis. La larmoj kvazaŭ torento inundis miajn manikojn. La tutan vesperon mi ploris. Poste, neatendite mi trankviliĝis, mi lavis mian vizaĝon kaj prenis la spegulon: "Dio mia, eble mi malbeliĝis, ĉu mi estas maljuna... Io ajn, mi vane amis, tiela fino... nur kvin vortoj post kvin jaroj." La torento de larmoj denove kaj denove elfontas, la kapo min doloras, centfoje mi tramarŝis la ĉambron. Mi kriis, blasfemis kaj... la nekontrolita rido min kaptis. La tristeco de la ĉambro ne ĉesas. La telefono.. mi silentas,, denove la telefono...

Diabla scivolemo tentas min "Mi devas al vi redoni viajn librojn" li nur diris. "Bone, venu ĉi tien." Li ne venis. Mi kelkan tempon nenien iris. Jam venis aŭgusto. Mi elektas la malĉefajn stratojn, li ankaŭ, ni promenas, mi sola. Mi ĉiam sentas ke li pasas ie proksime. La rememoroj fontas dum mi marŝas...al diablo li kaj lia amo...

Tra la ĉefa strato mi marŝis nur antaŭtagmeze, li tiam laboris. La vendejoj estis plenaj de diverskoloraj vestaĵoj. Mi aĉetis kelkajn kaj la speguloj ridetis al mi. Mi konstantis ke mi estas ankoraŭ bela kaj juna. "Via talio plaĉas al mi. Via svelta talio... via hararo bela" li kutimis ofte diri. Mi decidis ŝanĝi la harkoloron... ne mi ŝanĝos la frizaĵon... Mi aĉetis multe da vestaĵo kaj mi decidis ekvojaĝi. Liaj fenestroj ne estis lumigitaj jam dek tagojn, li eble ankaŭ ekvojaĝis... al diablo li kaj liaj fenestroj... Mi preparis min kaj juste kiam mi eliris aĉeti la bileton, mi rimarkis lin kune kun ŝi. Ŝia frizaĵo samkiel la mia estis, sed ŝi estis pli dika, ankaŭ pli juna, ŝajnas, ne multe. Tiumomente li rimarkis min kaj haltis. Ni manpremis, ŝi ankaŭ, ŝi afable ridetis. Mi ridetis kaj rapide elpensis "Pardonu, mia amiko atendas min je tiu angulo, mi rapidas." La koro batis, tiu koro perfidulo, sed mia vizaĝo eltenis, la okuloj ankaŭ. Mi estis fiera.

Do, tiu estas ŝi, ha,ha, mi freneze ridis...sed, la larmoj sen mia volo fontis. Mi estis furioza, kial mi haltis, stultulino, sed, ne gravas...Ĉu li iomete retenis mian manon... ŝajnas. Ne gravas, li por mi estas pasinto, li estas mortinto...malbenita estu li kaj...

Mi malamis lin, mi decidis ekvojaĝi, sekvatage mi ekveturis viziti mian fratinon.

Venis la aŭtuno, ankoraŭ estas varme, mi promenas ĉiutage. Kelkaj viroj apud mi ridetas, rigardas min...la viroj...kie li troviĝas mi rezignoprete pensas. Iun tagon mi decidis iri en la kinejon. Antaŭ la kinejo du larmoj en miaj okuloj ekbrulis. Granda doloro, sola en la kinejon, ho, Dio, kial mi estas tiel malfeliĉa. Mi revenas plorante, la piedoj pezas, ĉirkaŭ mi mallumo. Neatendite iu tuŝetas mian ŝultron: "Virino, ne estu tiel trista, vi venkos". Mi ŝtoniĝis. Lia vizaĝo lumigita ŝajnis, la okuloj verdaj, stranga vestaĵo, kvazaŭ mezepoka. Milda vizaĝo, varma rigardo, mi svarmjukadis. Li tuj malaperis, mia koro batis, mi timis. Mi kuris, kuris hejmen. "Tiu homo spitmokas, ve, Dio mia, eble mi freneziĝis, hejmen, mi estas malsana, mi halucinas...jes, mi halucinas, helpu al mi Dio, savu min. Mia strato, mi kaŝas la vizaĝon kaj tuj dronas en la kusenon. La ĉambro silentas, terura ploro chatas. Ĉi tiel plu oni ne povas, mi devas uzi medikamentojn...mi estas malsana..mi mortos...

La telefono, mi ne ellitiĝas, denove la telefono...denove...al diablo ĉiuj...mi dilemas, eble estas mia filino.

"Jes, kiu...vi...kion vi dez..."

"Demandu nenion, mi ne povas vivi sen vi, mi tuj venos..."

MONATO SIN PREZENTAS

Jen nia nova perata gazeto:

MONATO estas internacia novaĵmagazino eldonita en Belgio sed kun reto da kunlaborantoj, kaj legantoj, en la tuta mondo. Ĝi ne havas unu redaktoron, kiel la plimulto de la Esperanto-revuoj, sed dekon da ili, kiuj ĉiuj respondecas pri diferta temo. MONATO disponas pri redaktoro pri sciencoj, pri ekonomio, pri arto, pri politiko, pri lingvoj, ktp. Tiu ĉi amplekso laŭ diversaj fakoj garantias altan enhavan nivelon de la artikoloj.

MONATO nomas sin unika, alternativa, ekskluziva revuo. Ni petis Stefan Maul, fondinton de MONATO kaj nun unu el ties redaktoroj, kial.

UNIKA,

MONATO estas laŭ pluraj aspektoj.

* Ĝenerale oni povas diri, ke ĝi estas la unua sukcesa provo, eldoni revuon kun ĝeneralaj temoj-do ne pri-esperantaj - sur profesia nivelo, en Esperanto. Oni ne povas kompari ĝin kun iu alia revuo, ĉu Esperant- ĉu nacilingva.

* Unika ĝi estas ankaŭ pro tio ke nur helpe de Esperanto entute eblas, aperigadi tian revuon

* Kaj unika - kompare al aliaj Esperanto-revuoj - ĝi estas, ĉar MONATO traktas la tutan spektron de la moderna vivo, de politiko ĝis kuir-receptoj, de turismo ĝis por-infanaj temoj.

* Unika, fine, MONATO estas ankaŭ pro tio, ke per ĝi vi perfektigas per la ĉiutaga moderna Esperanto.

ALTERNATIVA,

MONATO estas ĉefe pro tio, ke ĝi ne estas farata laŭ la kutimaj principoj, kiuj regas nacilingvan ĵurnalismen: pri "sensacioj" el la tuta(?) mondo raportas eksterlandaj ĵurnalistoj, el plej diversaj landoj, sen koni la lingvon, kulturon, historion, sociajn kaj politikajn strukturojn de la koncernaj landoj.

* Por MONATO, male, raportas nur indiĝenaj aŭtoroj, kiuj vere konas siajn landojn, ne pri ŝajnaj sensacioj, sed pri la temoj kiuj vere gravas en tiuj landoj.

* MONATO estas alternativa ankaŭ rilate ĉiujn aliajn Esperanto-revuojn ĉar ĝi ne remaĉas Esperan-

to-movadajn temojn, sed per Esperanto malfermas al vi la vastan mondon hodiaŭan.

EKSKLUZIVA,

MONATO estas pro tio, ke en neniuj aliaj revuoj, ankaŭ neniuj nacilingvaj vi povas legi tion, kion alportas MONATO.

* Ĉiu aŭtoro verkas ekskluzive por MONATO originale en Esperanto - do ne estas tradukoj.

* Ekskluziva MONATO estas ankaŭ sur kampoj internaciaj, ĉar en ĝi oni rigardas aferojn ne el nacia, sed el internacia vidpunkto, aŭ - se temas pri konfliktoj inter diversaj landoj-rigardas la aferon el ambaŭ vidpunktoj.

* MONATO do, kontraste al ĉiuj aliaj gazetoj, ankaŭ estas ekskluzive internacia, la ĝusta revuo por homoj, kiujn interesas kunvivado de l'popoloj - esperantistoj veraj!

MONATO

* krome estas revuo por la tuta familio, ĉar de politiko ĝis distraĵoj ĝi enhavas ĉion.

* krome estas revuo, per kiu vi bonege povas finlarni la lingvon

* krome estas revuo, kiu donas abundan materialon por legi kaj diskuti kun konatoj kaj en grupoj.

* krome estas la plej bona propagandilo de Esperanto, ĉar montrante tian revuon al neesperantisto, en ekspozicioj, eĉ al sciencisto, vi rikoltos ne nur admiron, sed tujan agnoskon pri la valoro de la internacia lingvo.

* krome estas ideala por kursoj-ĉefe progresigaj kaj perfektigaj.


Kiu ŝatas ricevi provnumeron pri MONATO skribu al

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-1400 Antwerpen, Belgio.

* La abontarifo por unu jaro por Kroatio estas 17 guldenoj pagita al Kroata Esperantista Unuiĝo.

MONATO

Bildstrio: OMBRO (Aŭtoro: Ninoslav Kunc)



Doktoro Mijo Karagić jam estas konata al la legantaro de "Kroata Esperantisto". Se vi rememoras, en la unua numero tuj ĉe la komenco vi povis trovi lian poemon pri Šibenik, la plej bela urbo kiel li ofte mencias. Al la esperantistaro nun li estas konata kiel unu el tri redaktoroj de la poemkolekto "Poemaro de kroatoj en Hungario".

Li naskiĝis en la bunjeva-kroata vilaĝo Gara (suda parto de Hungario). Post la studoj li laboris kiel klerigisto en la malgranda Burgenlanda kroata vilaĝo Unda. Li intense kolektas skribajn dokumentojn pri la Burgenlandaj kroatoj. Li doktoriĝis pri la temo "Evoluo de la skriboscio kaj literaturo de la Burgenlandaj kroatoj". De la 70-aj jaroj li publikigas prozajn verkojn. Li estas ano de la Unuiĝo de kroataj verkistoj. Liaj noveloj estas publikigitaj en Aŭstrio, Hungario, Kanado kaj Kroatio. Nun li profesie sekretarias ĉe la Unuiĝo de kroatoj en Hungario. Li mencias, ke li estas granda simpatianto de E-o. Dum lia lasta restado en Zagreb, meze de decembro ĉ.j. li volonte respondis al kelkaj demandoj por "KE".

"KE": Vi sekretarias, precize Vi estas landa sekretario de la Unuiĝo de kroatoj en Hungario. Temas pri unu nova organizo, kvankam kroatoj dum pluraj jarcentoj vivas sur la teritorio de la hodiaŭa Hungario.

Karagić: Jes, la Unuiĝo de kroatoj en Hungario estis fondita en la jaro 1990. De tiam la kroatoj en Hungario havas sian superan organizon. Mi devas menci, ke ne estis facile organizi ĉi tiu organizon, ĉar ĝis tiam la kroatoj estis en unu sudslava organizo, nomita Demokrata unuiĝo de la sudslavaj kroatoj en Hungario. Vi komprenas kion signifas tio. Sed dank' al la sociaj kaj politikaj ŝanĝoj en Hungario, ni povis formi nian organizon. Mi devas menci, ke kroataj etnaj grupoj estas pluraj en Hungario: la burgenlandaj kroatoj, la ĉemuraj kroatoj, la podravinaj kroatoj, la bunjevaj kroatoj, la dalmataj kaj bosniaj kroatoj.

La unua tasko de la Unuiĝo estas kunordigi la interesojn de ĉiuj etnaj kroataj grupoj en Hungario. Se oni rigardas la geografian mapon, nia Unuiĝo estas dividita en ses memstaraj regionoj, sed ĉiuj kunlaboras kun la Unuiĝo. Preskaŭ en ĉiu loko kie vivas la kroatoj oni fondis societojn, klubojn.

Antaŭ ne longe ni havis kunsidon de nia Prezidentaro, kaj estis decidite, ke dum marto 1993 ni devus kunvoki eksterordinaran kongreson de la Unuiĝo. Ni esperas, ke dum la kongreso ni sukcesos solvi ĉiujn problemojn kiuj frontas la Unuiĝon.

"KE": La lernejo, apud la familio estas la plej grava "portanto" de la lingvo, La kroatoj en Hungario aplikas la instruadon en pluraj bazlernejoj, en gimnazioj, eĉ superaj lernejoj.

Karagić: En pluraj loĝlokoj ni havas bazlernejojn kie oni povas lerni en la kroata lingvo. Ni havas du gimnaziojn en Budapeŝto kaj Pecs. Oni povas studi la lingvon en Pecs kaj Szombathely kaj ĉe la universitato en Bdapest. En Sopron funkcias supera lernejo por vartistinoj.

Tio estas nur komenco, ĉar ĝis nun oni ne povis paroli pri la kroata lingvo, sed ĉu sudslava, ĉu serbokroata.

"KE": La Unuiĝo eldonas...

Karagić: Nia gazeto "Hrvatski glasnik" ("Kroata heroldo") aperas ĉiun semajnon. Ni eldonas jarkalendaron kun multaj interesaĵoj. Bedaŭrinde, ĉio dependas de la mono. Ĝis nun ni ricevis monon de la Hungara Parlamento. Ni esperas, ke same restos en la estonteco.

"KE": En Hungario oni pridiskutas novan prietnan leĝon.

Karagić: Jes, nun oni preparas ĝin. Ni multon atendas de ĝi, unuavice la eblecon havi reprezentantojn en la Hungara Parlamento kaj finanĉan garantion, kio ebligas nian agadon. Se oni akceptos tiun leĝon, ni esperas, ke ĝi estos vera modelo en Eŭropo.

"KE": La Unuiĝo kunlaboras kun aliaj kroataj organizoj en najbaraj landoj.

Karagić: Ni bone kunlaboras kun la kroatoj en Aŭstrio, Slovakio, Italio kaj aliaj. Fine de januaro venontjare (1993) en Budapeŝto gastos jarkunveno de kroataj organizoj el Eŭropo.

"KE": La rilatoj kun la patrolando estas tre abundaj.

Karagić: La ligoj kun la patrolando nun post la ŝanĝoj estas rektaj. Antaŭe ni kunlaboris, sed la ligoj estis nerektaj. Ni esperas, ke en la estonteco la ligoj estos eĉ pli efikaj ol ĝis nun.

Estas tre grave por niaj infanoj, junularo por la plifortigo de la nacia sento, ke la ligoj estu, ni diru, preskaŭ ĉiutagaj.

Kvar verkistoj kroatoj el Hungario membras en la Unuiĝo de kroataj verkistoj. Ĝuste hodiaŭ ni salutis ĉi tie en Zagreb 150 jaran jubileon de Matica Hrvatska (La Centro Kroata).

"KE": Dum la lastaj jaroj tiu ligo kun la patrolando estas riĉigita.

Karagić: La ligoj starigitaj inter nia Unuiĝo kaj la Kroata Esperantista Unuiĝo ricevis novan dimension. Tion montras nia ĵus prezentita komuna libro, poemkolekto de niaj poetoj vivantaj en Hungario.

Ni pridiskutis la kunlaboron inter niaj unuiĝoj por la jaro 1993, mi esperas, ke ĉi tiu kunlaboro estos plurlara.

"KE": Mi flanke de KEU samopinias, kaj dankas pro la intervjuo.



Prezento de la libro en Osijek de maldekstre: Dekić, Belošević, Karagić, Katalenac

Intervjuis: M.Belošević

ETULA PAĜO

Tuj ĉe la komenco ni deziras al ĉiuj ĉion bonan okaze de la festotagoj. Ni esprimas dankon al ĉiuj kiuj agadis por ni dum la pasinta tre malfacila jaro. Ni multon deziris eĉ multe, multe pli ol ni ricevis, sed karaj plenkreskuloj, ni komprenas vin, kaj dankas por ĉio, espereble ke la venonta jaro estos pli feliĉa, sukcesa, fruktodona por ni ĉiuj.

Ni denove eluzas la eblecon kaj invitas niajn samaĝulojn ke ili ne ludu militon, ĉar ĝi sufiĉis, ĉu ne, same por ni, kiel por tiuj kiuj nur devis ĉiutage rigardi raportojn ĉe la televido. Petu viajn gepatrojn, ke ili ne aĉetu plastikajn kaj alispecajn ludilojn-armilojn, ĉar ni devas forigi militon el ĉi mondo, komence en nia domo, nia ĝardeno, strato neludante per tiaj ludiloj.

Ni kaj vi kaj niaj gepatroj ne profitos de tio, profitas kaj profitos nur la ludil-industrio kiu produktas ilin.

Foliumante nian fotoalbumon, ni trovis kelkajn belajn fotojn kiuj memorigos nin pri belaj tagoj en la jaro 1992, ni deziras tiujn rememorojn dividi kun vi, kvankam vi nur laŭ niaj skribaj raportoj tiam estis kun ni.

Ankoraŭ foje, pli feliĉan kaj belan jaron al ni!

Petra Kondres, Zagreb



En Esperujo



Petra kaj Marko en budapeŝta bestoĝardeno



"Ne tuŝu la ebenajon" kantis junularo

AMUZAĴO

Jen nova tasko, forprenu unu literon de la vortoj kaj ne movante la aliajn vi ricevos novan E-vorton.

ANTENO
MULTA
POENTO

FILINO
PLEDI
PUNTO

SILIKO
TUNIKO

SOLE
VINTRO


La respondojn sendu al la adreso de Kroata Esperantista Uniĝo, Trg burze 2, 41000 Zagreb, Kroatio. Limdato: 30-a de januaro 1993.

Bildstrio: OMBRO (Aŭtoro: Ninoslav Kunc)

VI CERTE DEMANDAS
VIN KION MI FARAS ĈI
TIE

ONI DIRAS, ĈI TIU
BILDSTRIO ESTAS
TRE SIMPLA, KE ĈIU
POVAS ĜIN FARI

JEN LA KRAJONO
KAJ KVAR PAPERJOJ,
BONVOLU, NI VIDOS!



En la lasta numero de "KE" ni prezentis al Vi tekston de Stefan MacGill, prezidanto de ILEI.

Por ĉi tiu numero ni petis la ILEI-prezidanton respondi al kelkaj interesaj demandoj.

"KE": ILEI estas aliĝinta asocio de UEA. Kiaj estas la rilatoj kun UEA?

MacGill: ILEI estas aliĝinta faka asocio de UEA; tamen ĝi tenas organizan sendependecon. ILEI estas unika inter la FA, ĉar UEA al ĝi delegis la plenumon de sia agado sur unu kerna kampo - la instruado. Ni praktike devas labori proksime kun UEA, ĉar la rimedoj de ILEI estas tiom limigitaj - ĝiaj jaraj spezoj estas la tridekono de tiuj de UEA, kaj ĝia kapitalo kvardekono, nesufiĉa por plenumi la tutan laboron sur kampo, kiun mem la strategia plano de UEA levis al unu el la tri ĉefaj prioritatoj. En 1993 ni aliros UEA kun propono disponigi monon por subvencii la partoprenon de praktikantaj instruistoj el neriĉaj lando en niaj kursoj de instruista trejnado.

"KE": ILEI estas faka organizo de E-instruistoj kaj instruantoj, sed ĝi estas malfermita speciale kiam oni parolas pri la rilatoj kun la ekstera mondo.

MacGill: Tiuj en Ameriko progresas bone sub la gvido de nia vic-prezidanto prof. Glossop. En Eŭropo laboras e-ro Symoens en specifa projekto pri la Eŭropa Komunumo. ILEI prenis kontakton kun la gazeto "CONTEXT", por eŭropemaj instruistoj. Ĝi rilatadas kun UNESCO pri laborgrupo starigata por fronti la edukajn bezonojn de la venonta jarcento. ILEI bezonus pli da kapablaj laborfortoj por povi pli intense sekvi tiujn kontaktojn kaj establi novajn.

"KE": La ekzamenoj de UEA/ILEI eniris plurajn internaciajn E-renkontiĝojn. La jaro 1991 estis rekorda, eble pli sukcesa estos 1992, en kiu estis akceptita la regularo por la supera ekzameno.

MacGill: Tiuj pluiras sub la gvido de nova sekretario; ni anoncas sesion en KCE, 17-18 julio 1993, tuj post la instruista kurso de d-ro Charters. Ni planas anonci kontinentajn gvidantojn por malcentrigi la organizadon kaj la necedan laboron. Ni nun havas akceptitan regularon por la supera ekzameno, kiun multaj atendas, sed ĝi ne povos funkcii ĝis ni nomis la tri-personan prezidantaron kaj sekretarion. ILEI proponis al UEA unu prezidanton; d-ro Dahlenburg el Germanio. UEA nomos la ceterajn du, sed neniuj havas ideon, kiu kapablas kaj pretas esti la organiza motoro de la tuto - t.e. la sekretario.

"KE": En la teksto prezentita en nia lasta numero Vi donis komenton pri la eduka rezolucio akceptita dum la lasta UK. Ĉu Vi ion deziras aldoni, klarigi?

MacGill: Tio montris, le la kvanto de konata instruado malsufiĉas por konservi adekvatan parolkomunumon je proksime faktoro de dek. Alivorte, nia nuna agado, eĉ post la intensigo de la lasta jaro, sufiĉas por subteni parolkomunumon de ne pli ol 100.000 parolantoj. Dekobligi tion ILEI certe ne kapablas - ĝi havas nek la financajn nek la homajn rimedojn por tio. Se ni streĉas ĉiujn fortojn, trovos novajn, investos en maŝinoj kaj homoj, eble ni sukcesos duobligi la kvanton de instruado - tion ni provos fari emfazante la instruistan trejnadon.

La ŝosilo al ĉiu vastigo de nia laboro estas akiri pli da membroj, precipe de junaj aktivaj instruistoj, kaj pli da kunlaborantoj.

Intervjuis: M.Belošević

Ni esperas, ke Vi nun havas sufiĉe da informoj pri ILEI.

Se post tiom da legado Vi decidis membriĝi en ILEI nepre kontaktu ILEI LS en Kroatio, Trg burze 2, Zagreb.

Ni atentigas Vin, ke la kotizo por ILEI kiu inkluzivas la abonon al "Internacia Pedagogia Revuo" devas esti pagita ĝis la 1-a de marto 1993.

ILEI LS en Kroatio

DEKA INTERNACIA METODIKA SEMINARIO (IMS) Zagreb, 3a-8a de aprilo 1993

aŭspicianta de ILEI

Loko: Zagreb, Hotelo PARK (B-kategorio)
Ivanićgradska bb, HR-41000 Zagreb, Kroatio

Organiza adreso: Kroata Esperantista Unuiĝo, p/a Marija
Belošević, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb, Kroatio,
tel. 38 41 57 60 92

TEMOJ DE LA IMS:

- 1) Spertoj pri intensaj lingvo-kursoj
- 2) Pedagogia terminologio

Dum la IMS en Litovio montriĝis granda intereso pri intensaj lingvokursoj por junuloj kaj plenaĝuloj, pro tio ni deziras elvovi ĉi temon en la venonta IMS en Zagreb. Pli kaj pli divastiĝas t.n. celkursoj, kiuj ne volas-eĉ ne povas!-havigi kompletan lingvoscion (kompetenton kaj performancon), sed elektas iun celon, ekz. klarigi la fundamentan gramatikon, aŭ kompari la strukturon de Eo kun alia(j) lingvo(j) aŭ kapabligi legi fakliteraturon, aŭ doni ŝlosilon al ĉiutaga aŭ speciala konversacio, instruante sintagmojn, pretajn parolelementojn ktp.ktp. Tiaj kursoj preparas la kursanojn je diversaj (ekz-e fariĝi helpanto en UK, k.s.), aŭ je celekzamenoj. La intensaj kursoj estas ege variaj, diversspecaj kaj ili bezonas iom specialajn studmaterialojn, metodojn kaj rimedojn, sed ankaŭ psikologian aliron. Montriĝas bezono, pro tio ankaŭ intereso, ke ni interŝanĝu spertojn tiurilate: ni analizu la motivojn, kolektu materialojn, ideojn, prezentu la praktikajn manierojn kaj severe, reale tasku la atingeblajn rezultojn de la kursoj. La neceso de faka terminologio ne bezonas apartan argumentadon: por interkompreniĝi inter samfakuloj ne sufiĉas paroli la saman lingvon. Gravas, ke ni havu normigitan fakan terminaron pri pedagogio, didaktiko, metodiko, alie ni ne povas scii, kiu kion komprenas sub instrumentado, -maniero, -procezo, -vojo, -rimedo, -teĥniko, k.s., aŭ metodiko, metodologio, lingvo-pedagogio, glotodidaktiko, ktp. Diversaj verkistoj (Rakuša, Szerdahelyi, Szanser, k.s.) atribuas ne la saman signifon al la samaj vortoj. Sporede jam ekzistas klopodoj por la normigo, sed venis la tempo ke decidu la kolektiva prudento. Do, koran kolegan inviton al la deka IMS! Kontribu-proponojn por la programo sendu al ILEI, s-ino Barscay Zsuzsa, Bem Rakpart 25B, H-1011 Budapest, Hungario; tel. 36 1 201-2342. Prezentaĵoj daŭru prefere ne pli ol 30 minutojn.

EKSPozicio:

Dum IMS oni organizos ekspozicion de E-lernolibroj kaj instru-helpiloj. Kontribuojn al tio bonvolu sendi al KEU ĝis la 15a de marto 1993.

CSEH-SEMINARIO:

La Internacia Esperanto-Instituto en Hago organizos Cseh-seminaron paralele kun IMS. Partopreno: 230 DEM por orientanoj kaj 290 DEM por okcidentanoj. Tio inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj la kursmaterialon. (Aliĝilojn kaj kotizon sendu kiel por IMS).

EKZAMEN-SESIO:

KEU organizos ekzamen-sesion de la elementaj kaj mezaj lingvo-ekzamenoj de UEA/ILEI en la 5a kaj 6a de aprilo. Pageblaj surloke (60% de MA kotizo de UEA por via loĝlando).

INTERNACIA RENKONTIĜO POR GELERNANTOJ:

Prezo 200 DEM por plena pensio en la hotelo; 100 DEM por loĝigo en la hejmo de enurbaj lernantoj kaj manĝoj en la hotelo. La programo enkluzivos teatran prezenton de la gelernantoj-partoprenantoj, viziton al dolĉaj-fabrika, ktp.

ATINGI ZAGREBON:

Trajne: rektaj trajnoj estas el: Budapeŝto (tri tage), Vieno (du, unu IC), Parizo, Milano(Romo), Venecio (EC), Munkeno(Zuriko) (du, unu EC).

Buso: rektaj busoj el Triesto, Nagykanizsa(H), Barcs (H), Graz, Vieno kaj pluraj urboj en Germanio.

Aviadile: Rekte el pluraj eŭropaj urboj.

Estas konsilinde esplori ĉe vojaĝ-agentejoj, ĉar en tiu antaŭpaska periodo estos eksteraj trafikiloj, ofte kun avantaĝaj prezoofertoj.

SEKURECO

De post la komenco de 1992, ne estis alarmoj aŭ atakoj en Zagreb kaj de tiam la vivo normaligis. Ĉiuj institucioj, fabrikoj kaj lernejoj funkcias senprobleme. Dum la lasta jaro Zagreb gastigis plurajn mondajn okazaĵojn (foirojn, simpoziojn k.s.) kaj akceptis centon da eksterlandaj delegacioj senprobleme.

Unua manĝo: sabate, vespermanĝo. Lasta manĝo: ĵaŭde, tag-manĝo

La kotizo inkluzivas kvin plenajn pensiojn (tranoktadoj + tri manĝoj), aliĝon al al tuta programo kaj unu ekskurson:

orientanoj: 200 DEM ĝis la 1a de marto 1993 (230 DEM poste)
9000 HUF (10500 HUF)

okcidentanoj: 260 DEM ĝis la 1a de marto 1993 (260 DEM poste)

ILEI akceptos en Budapeŝto kotizojn en hungaraj forintoj de orientanoj ĉe la adreso de ILEI-sekcio. Aliĝojn oni akceptos forinte dum la Naciaj Hungaraj Pedagogiaj Tagoj en Budapeŝto (26-28 februaro 1993).

Kroatiaj rajtos pagi la kotizon dinare, laŭ la kategorio "orientanoj". Nur por urbanoj oni ofertas partoprenon sen loĝado, ĉar unu tranoko por eksterlandano en komparebla hotelo jam kostas pli ol cent markoj. Nur aliĝintoj rajtas partopreni.

Pagu en germanaj markoj al la valuta konto de Kroata Esperantista Unuiĝo, (Hrvatski esperantski savez) Trg burze 2, HR-41000 Zagreb, Kroatio ĉe Zagrebačka banka, Savska 60, HR-41000 Zagreb, S.W.I.F.T., Teleks: 21211 zaba, konto: 25731 3807975.

Pagojn akceptas KEU ankaŭ en sia konto ĉe UEA: kreu-g.

Bonvolu sendi kopion de via enpagilo, kune kun via aliĝilo al la organiza adreso.

KEU preparas pli detalan informilon, kiun ricevos ĉiu aliĝinto; ĝi servos ankaŭ kiel konfirmilo.

ALIĜILO AL LA DEKA IMS

Sendu al KEU, Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb, Kroatio.

Nomo: _____

Adreso/telefono: _____

Sekso: _____ Profesio: _____

Mi volas partopreni:

- ☐ IMS
- ☐ La Cseh- seminarion
- ☐ La Lernejan renkontiĝon
- ☐ Ekzamenon: elementan/mezan

Mi alvenos je: _____

Mi deziras dividi ĉambron kun: _____

Mi havas apartan dietan peton, nome: _____

Mi pagis la kotizon al: _____

kaj aldonas pruvilon por la pago.

Subskribo: _____

Dato: _____

La ekzamena eseo

Kiel mi iĝis esperantisto

Antaŭ dek jaroj, mia patrino komencis lerni Esperanton. Unu vesperon ŝi venis hejmen kun lernolibro de Esperanto. Ŝi surmetis ĝin sur la tablon kaj foriris. Mi ekvidis la ruĝan libron sur la tablo kaj prenis ĝin. La titolo estis: Esperanto. Mi estis sola en la ĉambro. Mi sidigis en la fotelon, malfermis la lernolibron kaj ekvidis la unuan lecionon. Ĝi ŝajnis tre facila al mi, ankaŭ mi memoris ĉion tralegitan.

Mia patrino estis en la kuirejo kaj preparis vespermanĝon. Mi eniris kaj diris: "Mi estas esperantisto." La patrino surprizigis kaj ekridis. Ŝi demandis: "Ĉu vi lernis Esperanton?" Mi diris "Jes". Mi povis diri nenion plu, ĉar mi ne sciis, sed mi decidis lerni Esperanton! En mia bazlernejo estis esperanta sekcio kaj mi anigis. Estis tre facile kaj interese lerni la internacian lingvon. Post kelkaj jaroj la zagrebaj esperantistoj organizis kvizon en Ĝurdevac, kie mia teamo estis la unua. La premio estis: pagita vojaĝo kaj restado en Sofio, dum la internacia infan-renkontiĝo. Tio estis mia unua "esperanto" renkontiĝo. En Sofio, mi renkontis gejunulojn kiuj parolis Esperanton. Mi ankoraŭ ne povis flue paroli, sed mi devis uzi Esperanton. En Sofio mi restis dek tagojn, konatiĝis kun multaj esperantistoj el la tuta mondo precipe el Hungario, Bulgario kaj Greklando. Kune ni traveturis al la Nigra maro, kaj tie restis tri tagojn. Estis tre bele, ĝoje,

interese kaj utile. Ankaŭ nun mi rememoras la belegajn impresojn pri la tagoj travivitaj dum tiu renkontiĝo.

Mi partoprenis en multaj esperantaj kvizoj, en Kutina, Vrbovec, Sisak, Sinj, ktp. Tie mi konatiĝis kun aliaj esperantistoj kaj korespondis kun ili. Mi pensis ke mi neniam povus ellerni tiom da lingvoj, por ke mi interparolu kun homoj el diversaj landoj. Mi tamen havis grandan intereson pri arto, muziko-fluto, krome mi amas poezion, artan literaturon. dank' al Esperanto mi renkontiĝis kun homoj diverslandaj kiuj havis komunajn kulturajn interesojn, kaj tio estis por mi tre agrabla. Mi korespondas pri la problemoj kiuj interesas min.

Mi havas ankaŭ eksterlandajn esperantajn amikojn. Ili invitis nin al siaj domoj, ili donis al ni nutraĵojn kaj tranokton. Dum Internaciaj pupfestivaloj en Zagreb mi konatiĝis kun Judit, Peter kaj Melinda. Miaj frato, patrino kaj mi vizitis ilin en Szombathely. Ni kune traveturis ilian landon.

Esti en E-movado, interrilatiĝi, travojaĝi, korespondi, amikiĝi kaj konatiĝi kun la tuta mondo estas motivo por lerni E-on kaj iĝi esperantistino.

Kiel bele estus, se ĉiu homo sur la tergloblo konus, krom sia gepatra lingvo, ankaŭ Esperanton.

Gordana Svetličić

Junulara mondo

Estimataj samaĝuloj kaj pliaĝuloj,

jen ĉe la fino de unu malfacila jaro ni direktigas al vi kelkajn vortojn.

Vi jam sufiĉe legis pri nia por-esperanta agado. Same ni multon kontribuis al la Zamenhofista festo. Pri ĝi bonvolu legi pli sur aliaj paĝoj kaj de alies plumoj. Ni aldonu, ke inter ni estas tiuj kiuj muzikas, sed same tiuj kiuj bone konas gramatikon, literaturon, movadon. Se Vi ne rimarkis, ĝuste nia animo sukcese faris Internacian Ekzamenon.

Ni nur povas ankoraŭfoje gratuli al Goga, kaj promesi ke ŝi kuraĝigis nin, ke venontjare ni pri la ekzameno pripensos iom pli serioze.

Nin atingis unu interesa letero kaj ĝin ni prezentas tutan, ĉar ja estas konate, ke ni nenion jaluze gardas por ni mem, do ekkonu same vi.

KZ & Jukica



tejo

tutmonda esperantista junulara organizo

Saskia Izenda, prezidento
Van Liefdaan 22
NL-3571 AB Utrecht
Nederlando
tel (+31) 30 732588

Komuniko
al la Esperanto-gazetaro
Novembro 1992

Subvencioj el Fondaĵo Partopreno IJK

Fondaĵo Partopreno IJK

La Fondaĵo *Maneŝla*, fondita dum la IJK en Kubo, ŝanĝis sian nomon al *Fondaĵo Partopreno IJK*. Nun ĝia celo estas multe pli klara: partoprenigi en la TEJO-kongresoj aktivajn, junajn esperantistojn kiuj mem ne havas sufiĉe da mono por la vojaĝo kaj restado. La Fondaĵo povas helpi ilin per subvencio de la vojaĝo aŭ la kongreskotizo. La juna Fondaĵo havas malgrandan kapitalon: dum 1993 elspezeblis maks. 1750 gultenoj. Per donacoj vi povas pligrandigi la Fondaĵon kaj plimultiĝi la subvenciojn; donaci al *Fondaĵo Partopreno IJK* estas same facile kiel al la Fondaĵoj de UEA. Informoj pri pagmanieroj troveblas en la Jarlibro'92 de UEA sur paĝo 43.

1992. Montreale

En 1992 la Estraro de TEJO elektis el inter kvin latinamerikaj kandidatoj la brazilanon Wagner Lopes. La subvencio de 1500 gultenoj el *Fondaĵo Partopreno IJK* ebligis al li vojaĝi al Montreale por ĉeesti la 46an Internacian Junularan Kongreson. Wagner partoprenis la Komitatungskonferencon de TEJO kiel Komitatano A por BEJO; por plia kunlaborado en la estonteco, li persone elektis Komitatano C. Li aktive ĝuis la kongresan programon, kaj povis persone konatiĝi kun junaj esperantistoj el Eŭropo kaj Norda Ameriko. La kontaktoj inter BEJO kaj TEJO plintensigis: unua rezulto estas la nomumo de brazila redaktoro por la latinamerika rubriko en TEJO tutmonde.

1993. Vraca

Por 1993, ni decidis pri iom alia uzo de la disponebla mono:

Dek junaj, aktivaj esperantistoj povos senkoste partopreni la 48an Internacian Junularan Kongreson en Vraca (Bulgario).

Speciale invitataj estas gejunuloj el Albanio, Rumanio kaj la eks-jugoslavaj ŝtatoj.

La *Fondaĵo Partopreno IJK* pagos por ili la plenan kotizon, kiu inkluzivas la programon, nutradon kaj noktumadon en junulara hotelo. La IJK en Vraca okazos de la 7a ĝis la 14a de aŭgusto 1993.

La kandidatoj estu aktivaj esperantistoj en la TEJO-aĝo (maks. 30-jaraĝaj) kaj skribu leteron kun informoj pri siaj aĝo, okupo, kaj Esperanto-aktiveco. La letero alvenu antaŭ la 15a de marto 1993 en la Centra Oficejo en Roterdamo.



Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefona +3110 436 1044 / Teletakso +3110 436 1751 / Telekso 23721 uea.nl

Ĉi foje ni prezentas al vi kelkajn prilernajn ŝercojn por la longaj vintraj tagoj.

*

- Joĉjo, vi denove malfruis en la lernejon?
- Jes, sed mi ne kulpas!
- Sed kiu?
- Tiu trafiksimbolo sur kiu estas skribite: "Mal-rapidigu, lernejo!"

*

Instruistino: Friĉjo, kiuj dentoj aperas plej laste ĉe la homoj?

Friĉjo: La artefaritaj!

*

Instruisto: Mi ludas, estas estanta tempo; mi vidis, estinta tempo; mi iros en la teatron, estonta tempo.

Jen Henriko, kia tempo estas la jena: mi petos monon de via patro.

Henriko: Tio ĉi estus tempo...perdita!

*

Instruisto: Dio estas ĉion-scianto: jam en la Biblio...

Lernanto: Sinjoro instruisto, vi mensogas!

Instruisto: Kio? Mi pravas, mi vin...

Lernanto: Bonvolu klarigi, kial vokis la bona Dio: Adamo, kie vi estas?

*

Instruistino: Parazitoj estas ĉiuj tiuj bestoj, kiuj vivas de aliaj: ekzemple, puloj, pedikoj, cimoj...

Lernanto: Kaj la riĉuloj!

Instruistino: Kial?

Lernanto: Ĉar ili manĝas kaj ne laboras!

GO Ludo

En la lasta numero de "KE" ni promesis al vi mal-longan prezenton de "GO-ludo" kiun preparis por ni s-ro Aleksandar Kocian en Osijek, multjara GO-ludanto.

Esperantista Go-Ligo Internacia estis fondita en la jaro 1979, kaj kunlaboras kun UEA.

La Ligo havas ĉirkaŭ 150 membrojn en 28 landoj.

La celoj de la Ligo estas disvastigi Esperanton per la ludo goo, kaj goon per Esperanto. La kotizo estas 2 usonajn dolarojn aŭ 6 respondkuponojn.

La adreso: 2-26-2 Kozima, Tyohu, Tokyo, 182, Japanio.

* * *

GOOn oni ĉine nomas Vej ĉi.

La ĉefaj signoj de goo estas:

- la ludiloj estas tiel simplaj, ke oni povas fari ilin el iuj ajn materialoj,
- ludkosto estas la plejmalmultekosta
- la baza regularo estas simpla kaj facile memorebla
- ĝi kultivas la penspovon kaj protektas la homan cerbon kontraŭ maljunigo
- la handikapsistemo estas tiel racia kaj subtila, ke la ludantoj kun iom ajn malegala lerteco povas ĝui inter si kun plena plezuro
- ĝi ne taŭgas por malvirtaj vetoj, ĉar hazardeco ludas nenian rolon

La ludiloj de goo konsistas el tabulo kaj ŝtonoj nigraj kaj blankaj. La gotabulo havas 19 horizontalajn kaj samnombrajn vertikalajn liniojn, kiuj faras 361 (19x19) kurciĝajn punktojn, inkluzive tiujn sur la 4 lateroj kaj 4 verticoj.

Ĉe la komenco de la ludo nenio kuŝas sur la tabulo, ne simile al la ŝakludo. La ŝtonoj konsistas el nigraj kaj blankaj, kies formala nombro estas 181 kaj 180 respektive, kvankam 150 estas sufiĉe en ordinaraj ludoj. La unua ludanto metas nigran ŝtonon, kaj la alia blankan sekvante, sur punkto kiu plaĉas al ili. La ŝtonoj estas metitaj ne en la kvadratoj, sed sur krucpunktoj, nesimile al la ŝakludo. Nigro kaj Blanko metas nigran kaj blankan alterne po unu sur la plaĉan, sed, kompreneble, ankoraŭ neokupitan vakan punkton. Ĉiu ŝtono jam metita restas sur la sama punkto ĝis la fino de la ludo. La ludanto kiu sukcesas finfine "ĉirkaŭi" pli multajn punktojn en siaj teritorioj gajnas la ludon.

Aleksandar Kocian

Estimata redakcio,

En tiu terura milito kaj sufero de la kroatoj kaj aliaj en Kroatio kaj Bosnio kaj Hercegovino, kiun al ni preparis la grandserb-jugoslavia agresantoj, gvidataj de grandserb-komunisma ideologio, mi kiel malnova esperantisto, humanisto kaj demokrato ne povis silentigi min. Tial, mi kredas-kiel ankaŭ multaj -kaj ĝuste starigis la demandon: Kial tia silentego en Esperantujo? Kial oni ne levas la voĉon kontraŭ agresantoj?

Jam la 6-an de novembro 1991 mi sendis -pere de nia komunumo - al CO de UEA en Roterdam "Apelon por paco en Kroatio kaj kondamnon al agresanto". Mi sincere bedaŭras, ke en la oficiala organo de UEA "Esperanto" aperis eĉ ne noteto pri tio. (La apelo prezentita en "KE" nro: 3/92) Dum mi kredas, ke oni devus ekmovi fortan mond-esperantan lavangon por komdamno al agresanto. Ankaŭ niaj E-organoj en Kroatio ie "perdiĝis" kaj tre longe silentis, pro kio mi kontente atendas la novan gazeton de KEU "Kroata Esperantisto". Mi fervore subtenas ĝian naskiĝon(renoviĝon) dezirante al ĝi fruktodonajn suk-

cesojn por Bono, Paco kaj ĉiufanka kunlaboro kun la demokrataj fortoj de la mondo.

Intertempe, kiel malnova kaj sindona esperantisto, partoprenanto al la 38-a UK en la jaro 1953 en Zagreb, kiun jaron fondiĝis E-elsendo en Radio Zagreb, kaj kiun mi aŭskultadis plurjare - mi devas esprimi mian miron kaj proteston pro la "estingo" de E-voĉo el Zagreb. Mi ne povas kredi, ke en la longe atendata demokratio en nia kara patrujo (kaj ŝtato) Kroatio, povas naskiĝi la retrograda penso nuligi la vivon de la internacia lingvo Esperanto (ilo por paco kaj internacia kunlaboro!).

Mi estas konviktita, ke ni denove aŭdos E-voĉon el Radio Zagreb, kaj en pli konvena horo ol la ankaŭa!

Amu Kroation sed ankaŭ la mondon!

Ĉiam optimisto, mi sincere salutas Vin.

Ivo Puharić, Makarska

Bedaŭras situacio en via lando.

Informu se mi povus helpi.

Jesuo Perez, Barcelona

Bildstrio: OMBRO (Aŭtoro: Ninoslav Kunc)

